

la Riverego

ISSN 0830-9574

Bulteno de Esperanto-Societo Kebekia

Oktoebro 1986. Numero 4-a. Jarkolekto 1-a.



INTERNACIA JARO DE PACO 1986

redaktore

Nu, la jaro de la Paco baldaŭ finiĝos. Ĉu vi rimarkis ĝin. Nia prezidanto jes faris, en Sovetunio. Espereble, ni pli bone rimarkos la venontan jaron, Jubilean. Ne forgesu rememrigi.

Krom artikoloj pri vojaĝoj, ĉi tiu *Riverego* traktoŝ ĉefe la ĝeneralan kunsidon aŭgustan kaj apudajn temojn. Tiu kunsido certe estis la plej vigla ekde la komenco de E.S.K. Okazis vera diskuto.

Tamen, ŝajnis al mi, ke la membroj pli laborigis ol laboris. La kunvenon petis la estraron fari laborplanon por la memuaro, okazigi ĝeneralan kunsidon kiel eble plej baldaŭ. Oni petis de mi alian finanĉan raporton.

Sed neniu sin proponis por helpi: antaŭenigi la projektojn. Ne elektiĝis LKK por Maskuto, ni tro longe diskutis pri la datoj. Por la Jubileo, multaj proponis "ke E.S.K. faru tion", sed neniu "ke mi faru tion por la Jubileo". Mi eĉ sentis iun... malfidon al la estraranoj, kiuj faras sian eblon.

Espereble, tio ŝanĝiĝos,

Saluton.

Bulletin trimestriel de la Société québécoise d'Espéranto.

La Riverego estas eldonata de Esperanto-Societo Kebekia. Aperas trimonate. ISSN 0830-9574

Dépôts légaux: bibliothèques nationales du Canada et du Québec: 1^{er} trimestre 1986.

Pri la enhavo de siaj artikoloj respondecas la aŭtoroj mem.

Redaktoro: Sylvain Auclair

Senpage por la membroj de E.S.K. Por la aliaj: jara abono: 5\$, aerpoŝte 6\$. UEA-kodo: kebk-d

Adreso: Société québécoise d'Espéranto

C.P. 126, succ. "Beaubien"

Montréal, Québec

KANADO H2G 3C8 tel.: (514) 495-8442

ĜENERALA KUNSIDO

La estraro de E.S.K. oficiale invitas la membrojn ĉeesti eksterordinaran ĝeneralan kunvenon. Ĝi okazos vendredon 17-an de oktobro, je la 19h30, ĉe 6358, rue de Bordeaux, Montréal.

Tagordo:

0. Malfermo: elekto de prezidanto de protokollanto; akcepto de la tagordo, de la pasintkunsida protokolo.
1. Jubileaj projektoj
 - a) prezento
 - b) diskuto kaj decidoj por ĉiu projekto.
2. Maskuta kunveno (somero 1987)
3. Fermo.

Eblas, por neĉeestontoj, skribe aŭ telefone proponi projekton. La membroj prefereble venu kun detala projekto (inkl. kostojn).

Sylvain Auclair
por la estraro

PACO en Sovetio


de Normand Fleury

La jaro 1986 estas la Internacia Jaro de Paco. Tial mi volas prezenti al vi la Sovetian Pacfonduson.

La nuntempa prezidanto de la Sovetia Pacfonduso estas la famkonata ŝakludisto Anatolij Karpov. Tiu ĉi fonduso estis oficiale satrigita en 1963 kaj estas unika en la mondo. Financas ĝin nur libervolaj donacoj de la Sovetianoj. Pasintjare, 19 milionoj da Sovetianoj donacis iun sumon al la Fonduso. Se la meza donaco estis unu rublo, tiam la Fonduso ricevis 19 milionoj da rubloj, aŭ 40 milionoj da dolaroj. Kiel oni kolektas la monon? Plej ofte la donacoj venas de libervolaj laborbrigadoj dum libertempo. Ekzemple junuloj purigas parkon kaj la mono, kiun ili ricevas pro tio iras al la Pacfonduso. Same, taksiisto donacos unutagan salajron aŭ grupo de Esperantistoj organizos spektaklon favore al la Fonduso. Fakte, plej diversmaniere oni kontribuas aŭ organizas ion por la Fonduso.

Estas bele kolektadi monon, sed kion fari per ĝi? La suba skemo helpas vin kompreni la strukturon de la Sovetia Pacmovado.

SOVETIA PACFONDUSO



La PacKomitato

La Sovetia Packomitato estas la plej granda Pacasocio en Sovetunio. La estaro kunvenas ĉiu-semajne.

Kvankam la Packomitato estas la plej grava pacasocio, ĝi ne regas la tutan enlandan movadon. Aliaj organizoj en *La Sovetiaj Altetoj por la Paco*, *La Medicinistoj por la Paco*, *La Mondpaca Esperantista Movado*, kaj simile, estas tute liberaj agi siaflanke, sendepende, sed semtempe ili rilatas kun la Sovetia Packomitato.

Enlande, la Packomitato taksas la publikan edukadon tre grava. Ĝi eldonas kvinlingve revuojn pri la paco. La edukprogramoj okazas ĉe la sportejoj, la fabrikoj, la lernejoj, k.t.p.

Eksterlande, la Packomitato rilatas kun diversaj landan pacorganizoj kaj interŝanĝas spertojn, informojn. Tiucele ĝi uzas plurajn lingvojn kaj la Sovetiaj geesperantistoj provas enkonduki Esperanton tien.

Fine, mi volas mencii, ke mia dusemajna restado en Sovetio estas tre agrabla sperto dank'al al uzebleco de Esperanto. Mi vere ne sentis lingvajn problemojn parolante kun centoj da Sovetianoj pri paco kaj multaj aliaj temoj. Mi tre ŝatus reiri tien ĉar mi havis la eblecon viziti Moskvon kaj Volgogradon (antaŭe Stalingrado) sed aŭdis ke multaj aliaj urboj estas ankoraŭ pli vizitindaj, kiel Lenigrado. Mi ricevis tiom da varmaj invitoj kaj korespondpetoj de Sovetianoj. Mi kun plezuro sendos liston de 30 adresoj, se iu ŝatus korespondi kaj amikiĝi kun Sovetiano.

Ju pli da kontaktoj kaj da rilatoj estos inter Kanado kaj Sovetio, des pli ni ekkonos unu la alian kaj des pli lernos pace kuŭvivi. Jen mia espero. □

de Patrice Mongeau

Multaj Kanadanoj demandis al mi, kiam mi revenis el Ĉinio: "Ĉu Ĉinio ege malsimilas al nia lando? aŭ Ĉu estas malfacile kompreni iliajn vivmanierojn?"

Mi ĉiam respondas, ke oni tuj sentas sin hejme. La Ĉinoj manĝas, laboras kaj dormas. Ili multe babilas kaj ĉiam ridetas. En la urboj estas stratoj kaj domoj. En la stratoj oni veturas per biciklo aŭ aŭtobuso. Oni povas aĉeti ĉion en vendejoj. Mi eĉ vidis komputilojn. Kompreneble tiujn aparatojn neniu Ĉino aĉetas, ĉar unue ili ne havas sufiĉe da mono kaj due ili ne bezonas. Sed entreprenoj aĉetas ilin. En Ŝanhajo, ekzemple, iu vendejo vendas ĉiunonate ĉirkaŭ kvindek komputilojn. Grandaj kaj luk-saj restoracioj ricevas ĉefe turistojn, sed multajn kvartalajn restoraciojn vizitadas Ĉinoj. Meze de la urboj estas malnovaj ĉinstilaj unuetaĝaj domoj, kaj ĉirkaŭ la urbo kreskas grandaj modernaj apartementaj domegoj. Dimanĉe, la urbaj Ĉinoj promenas en la belegaj vastaj parkoj aŭ en la vizitindaj lokoj kiel la temploj, al bestĝardenoj k.t.p. Ili manĝas glaciaĵojn, bombonojn kaj fruktojn. Ili ankaŭ ŝatas promeni per remboatoj en la basenoj de la parkoj aŭ en lagoj ofte artefaritaj antaŭ multaj jarcentoj.

Ĉu ĉio ĉi estas tiom surpriza? Jes, la vivnivelo en Ĉinio estas iom malpli alta. Sed tio estas supraĵo. Homoj estas homoj. La homoj de la tuta ter-globo apartenas al unu granda familio. Tion oni tuj sentas, kiam oni aŭdas Ĉinojn paroli Esperante, ĉar la etoso tuj fariĝas amika.

Kiam mi estis reveninta, amiko de mi rakontis al mi sian ĉi-someran vojaĝon al la maraj provincoj de Kanado. Mi surpriziĝis, ke li diris, ke tie la lando estas kvazaŭ alia.

Kiel tiom proksima loko aspektas al li tiel ne-
kutima, dum al mi aspektas Ĉinio tiel hejma? Laŭ
mi, la kialo estas jena: por bone komprenigi ion,
efika strategio estas emfazi tion, kion la aŭskul-
tanto jam prijuĝis alie.

Tamen...

Tamen estas ankaŭ surprizaj aferoj en Ĉinio. Ni
vidis homon transporti sur triciklo ĉirkaŭ dek bi-
ciklojn. En Ŝanhajo, kiam la suno estas subirinta,
multaj homoj sidas sur la trotuaroj. Kelkaj legas
aŭ kartludas sub la stratlumoj. Aliaj simple babi-
las kaj iuj eĉ dormas. Kelkaj trotuaroj estas tiom
plenaj, ke duono de la homoj sidas surstrate. La
aŭtobusoj preterpasas iliajn seĝojn kaj tio ŝajne
ne ĝenas ilin

Ni luprenis Ĉinajn biciklojn en Pekino kaj mul-
te veturis. Biciklo estas tre praktika veturilo
tie. Biciklante en la urboj, oni ĉiam estas ĉirkaŭ-
ata de bicikloj ĉiuflanke. La ĉefaj stratoj estas
tre larĝaj, kaj la bicikloj ne rapidegas. Tial, ki-
am la semaforo ŝanĝiĝas, la biciklantoj, kiuj jam
estas transirantaj iudirekte ne havas la tempon a-
tingi la alian flankon de la strato antaŭ ol de la
alia strato venas la aliaj. Tiam, ĉiuj estas meze
de la stratkruciĝo kaj ĉiu provas iri siadirekte.
Kiam baldaŭ pluvos, multaj biciklantoj haltas sub
la pontoj. Post la pluvo, por trapasi akvotruon,
ili levas la gambojn ambaŭflanken, tial ke akvo
ŝprucas.

Jen lingva amuzo. Kiam Ĉino vidas vin matene,
tiu demandas: "Ĉu vi matenmanĝis?" Tio estas laŭ-
vorta traduko de Ĉina esprimo kiel la Esperanta
"Bonan matenon" aŭ "Bonan tagon". Eble oni povus
klarigi, ke tiu, kiu matenmanĝis, certe havos bo-
nan tagon! □

NOTOJ

Normand Fleury pasigis du semajnojn en Sovetunio, en aprilo. Li estis invitita de la Soveta Sekcio de Mondpaca Esperantista Movado. Estis kongreso pri paco, en Volgagrado. Lia tuta vojaĝo kaj restado estis senpaga. Li anstataŭis la Kanadan peranton de MEM, Richard Piper.

Patrice Mongeau vojaĝis en Ĉinio, kun sia edzino Suzanne Bolduc, dum unu monato, okaze de la 71-a Ŭ.K., en Pekino. □

\$\$\$

La kotizoj de E.S.K. iom altiĝis. La ĉefa kialo de tio estas *la Riverego*, nova servo por la membroj. Tio multe kostas.

La nova bazo kotizo estas 7\$. La aliaj kotizoj varias laŭstatute. Ili estos, por individuaj membroj: 7\$ por ordinara membro, 11\$ por paro, 3,50\$ por junulo, 175\$ por dumviva membro. La kotizo por Amiko de Esperanto restas je 2\$.

La kotizoj por grupanaj membroj estos: 5,50\$ por ordinara membro, 3\$ por junulo kaj 8\$ por paro. Memoru ke la grupanaj membroj pagas sian kotizon ne al E.S.K., sed al sia klubo. La klubo pagas al E.S.K. □

Augusta kunsido

La jara statuta ĝenerala kunsido okazis la 23-an de aŭgusto, en la Montreala Esperanto-Domo. Ni multe diskutis, kelkfoje iom vigle, sed ŝajne ne sufiĉe, ĉar la ĉeestantaj membroj petis, ke oni baldaŭ okazigu alian kunvenon (Vd. paĝon 3-an).

Dum la pasinta financa jaro (ĝis la 31-a de majo), E.S.K. profitis je 109,63\$, kvankam ni multe pli agis ol dum la pasintaj jaroj. La dissendo de du *La Riveregoj* kostis pli ol 100\$. La suma kotizaro estis 186,50\$.

Restas ĉiam 560\$ en nia Memuara Fondaĵo. Tiun sumon ni ricevis de Eduka Fondaĵo Carson por eldoni nian memuaron "sur l'opportunité d'introduire l'enseignement de l'Espéranto dans les écoles du Québec". (Tio ne estas la ekzakta titolo.) Ni multe diskutis ankaŭ pri la memuara agado mem.

Ni ankaŭ multe diskutis pri la venonta E.S.K.-K.E.A. kongreso en Maskuto (St-Hyacinthe), venontsomero. Estas multe por fari. Kaj ankaŭ pri niaj Jubileaj projektoj: kiom E.S.K. faros por celebri la centjariĝon de Esperanto. Pri tiuj du punktoj, restis multo pro paroli kaj fari. Ni (esperble) finos tion dum la venonta ĝenerala kunsido, post du semajnoj.

Kebek(i)o

Dum la ĝenerala kunsido, ni ankaŭ diskutis la lastnumeran artikolon: "Kebekio aŭ Kebeko". Edmond Brent faris preskaŭ prelegon pri tio, substrekante la netaŭgecon kaj eĉ danĝeron de tiaj decidoj, faritaj de eminentuloj, kiuj ne sekvas la ĝisnunan lingvan uzon. Ni ĉiuj ĉiam diris Kebekion, kial ni ŝanĝus tion? Ni do konservos nian nomon: Esperanto-Societo Kebekia. □

Dumviva membro

E.S.K. ĝoje akceptis sian unuan dumvivan membron: Manuel Campagna (li elektis por si la jenan Esperantan nomon: Manùelo Kampanjaña). Li pagis 150\$, kiam li alvenis por la jara ĝenerala kunveno, ... ĵus antaŭ la altigo de la kotizo...

Bonvenon al Manùel'! □

membraro

E.S.K. nun havas tri membrojn ekster Kebekio: Manuel Campagna, Cleve Lendon, ambaŭ el Otavo, kaj Yvette Vallée, el Nov-Brunsviko. *La Riverego* ankaŭ legas kvar abonantoj, du en Kanado, unu en Resp. Koreio, unu en Sovetio. Vi povas ĉiam abonigi leteramikon.

Entute, E.S.K. havas 47 membrojn, kaj dek Amikojn de Esperanto (kiuj laŭstatute estas nevoĉdonrajtaj membroj). Do preskaŭ entute 60 membrojn, anstataŭ 40 pasintjare. □

KUNE

Se vi estas E.S.K.ano, vi trovos, kun tiu ĉi *La Riverego*, la memroliston por 1986 (47 membroj) kaj la aliĝilon por 1987 (jam...).

Ne forgesu, ke 1987 estas la Jubilea Jaro. □

Ryszard Stempień, str. C. Skłodowskiej 9, 59-840 Zawidów, Pollando. 33-jaraĝo fraŭlo, interesiĝas pri sporto, filatelio, turismo, fotografio, filmo kaj moderna muziko.

Gustavo C. Monales, Dardel Nº 209, Cobos y Barutia, Rpto: D'Beche-G'boea 11, C. Habana, KUBO. Volas interŝanĝi bildkartojn, poŝtmarkojn, revuojn, aŭ simple interparoli pri la Esperantista movado kaj lingvo.

Leon Gozdz, 18-400 Łomża, ul. Ks. Anny 2m3, Pollando. 32-jaraĝa viro. Komencanta esperantsito. Parolas ankaŭ angle kaj ruse. Interesiĝas pri ĉiuj temoj.

Xu Xiaoge, Pingyang No. 1 Middle School, Pingyang County, Wenzhou City, Zhejiang Province, Ĉinio. Deziras korespondi pri ĉiuj temoj. 28-jaraĝa, instruisto pri la angla lingvo kaj pri Esperanto. Interesiĝas pri verkado kaj tradukas en Esperanton kaj en la anglan lingvojn.

☺ Mariusz Maj, 8-GO B.P.P. 9/309 DS1, 85-324 Bydgoszcz, Pollando. Komencanto, kiu lernas sole la Esperantan lingvon. Lernanto pri kemio

Frashide Arabshahi, shahin-shahr, Ferdosi, 233 st., No3, Isfahan, Irano.

24-jaraĝa tajpistino. Ŝatas Esperanton, foton, sporton, korespondadon, forvojaĝon. Volas korespondi kun Esperantistino, por krei realan amikecon, kaj trovi informojn pri vojaĝo al nia lando, pri niaj kutimoj kaj vivmanieroj.